

Proklamo de la islamo en Francio

Proklamita de D^{ro} Dalil Boubakeur,
rektoro de la Granda Moskeo de Parizo,
la 28^{an} de marto 2017

Elfrancigita kaj komentita de Emanuelo Arbaro*,
magistro pri protestanta teologio,
la 9^{an} de aŭgusto 2017

Unua versio (09/08/2017)

Antaŭparolo

La Granda Moskeo de Parizo, institucio kreita de ŝtata leĝo, estas konscia de siaj responsoj ene de la franca islamana komunumo rilate al la religiaj pensado, interpretado kaj lumigo. Ĝi scias ke ĝi havas kiel devon akompani la Francojn kiuj konfesi islamon en ilia spirita vojo.

Ĝin zorgigas la plipotenciĝo, ene de la franca socio kaj ene de plena parto de ĝia politika, amas-komunikila kaj intelekta elitoj, de ekstrema diabligo de la islamana malplimulto : la islamofobio. Tiu lasta estas konsekvenco de la islamopsikozo¹, kiu estas konceptado delira, tio estas malkonektita de la realeco, kiun sinfaradas la franca socio pri kio estas reale la islamo kaj la Francoj kiuj konfesi islamon.

Ĝi sin alarmas pro la fakto ke la francaj islamofobio kaj islamopsikozo estas hodiaŭ sendube kompareblaj je graveco al la franca kontraŭjudismo² de la fino de la 19^a jarcento.

Ĝi kondamnas la nuntempan inklinon voli nomumi leĝajn kuratorojn, kiuj ne estas islamanaĵ, por enkadrigi paternalisme la esprimon de la islama religia fakto en la franca socio: tio, kontraŭ la religia libereco kaj la disiĝo de la eklezioj kaj de la ŝtato³.

*La teksto mem de la *Proklamo*, kune kun sia antaŭparolo, estas netuŝita (tiom kiom eble) traduko de la origina *Proclamation de l'Islam en France*; la komentoj do troviĝas nur en la piednotoj, kiuj ĉiuj estas de mi. Mi ne estas islamologo, kaj eĉ ne parolas la araban, tiuj komentoj do estu legataj nur kritikeme. Se vi havas kritikojn, mi ĝojus legi ilin sur mia blogo: <http://che-emanuelo.blogspot.com>, kie mi publikigis resumon de tiu *Proklamo* kaj kie eblas elŝuti ĉiam la lastan version de tiu traduko/komento.

1. Tiu vorto estis kreita de la franca politiksciencisto Thomas Guénolé (vd. <https://blogs.mediapart.fr/pascalboniface/blog/120417/islamo-psychose-3-questions-thomas-guenole>). La difino de tiu koncepto estas verkita tie ĉi konforme al la penso de ĝia kreisto, kiu rekte partoprenis kiel neislamana helpisto la verkadon de tiu *Proklamo*.

2. La aŭtoroj de la proklamo uzis la vorton «antisemitisme»; nur pro lingvaj kialoj mi decidis ne uzi la esperantlingvan vorton «antisemitismo».

3. Tiu *Proklamo* estis publikigita iom post la nomumo de la franca politikisto Jean-Pierre Chevènement, iam ministro

Ĝi estas maltrankviligita de la plipotenciĝo⁴, ene de la franca islamana komunumo, de interpreto malĝusta de la islamo, fondita de legado elektema, partia, malmetaforema, kiu kondukas al la obskurantismo, al la sencia pedanteco, al la mizogineco, al la sektismo kaj al la rifuzo de la respublikaj valoroj. Ĝi tamen konstatas ke la predikistoj de tiu perdita kompreno de la islamo estas marĝenaj, kaj ke la kredantoj kiuj aliĝas al tio estas malplimultaj.

Ĝi konstatas ke laŭ la haveblaj sociologiaj enketoj la plej freŝdataj, proksimume tri kvaronoj de la Francoj kiuj konfesias la islamon jam vivas en pacema, tolerema, kompatema, respublika kaj laika islamo.

Ĝi konstatas ke tiu grandega plimulto de la Francoj kiuj konfesias la islamon ŝatus havi tekston kiu klarigus iliajn rajtojn kaj devojn en ilia fido.

Malfermita je la spirita dialogo ke tiu teksto certe estigos, la Granda Moskeo de Parizo publikigas do per tiu ĉi teksto, je la atentigo de la franca islamana komunumo sed ankaŭ de ĉiuj virhomoj kaj hominoj kun bona volo en Francio kaj en la mondo, tiun *Proklamon*.

Proklamo

1. La islamo en Francio estas nek nova islamo, nek novaĵo⁵. La islamo en Francio simple estas la klarigo de la dogmo rilate al la hodiaŭaj realaĵoj. La islamo en Francio estas la rezulto de reinterpretado de la teksto kiu konsideras la ĉirkaŭaĵon, tio estas la *ijtihad*⁶.
2. Ĉiu islamano atentu ne serĉi sian religian kulturon ĉe fontoj, predikistoj, televidpredikistoj, kiuj ne estas agnoskitaj de la kleruloj⁷ la plej respektataj de la komunumo. Li preferu legi rekte la skribaĵojn de tiuj kleruloj. Li ankaŭ protektu sin kontraŭ la peko de orgojlo, kiu estas doni lecionojn pri kio estas esti bona aŭ malbona islamano kiam oni mem havas nur maldiskuteman, malprofundan kaj malprecizan religian kulturon.
3. Ĉiu islamano atentu ne emi la senpripensan kaj obsedan respektadon de reguloj sen spirita celo. Ĉiu islamano atentu protekti sin de la malprofundaj diversioj, por koncentriĝi pri la respektado de la spiritaj principoj de sia fido.
4. Estas islamano tiu, kiu kredas je la unueco de Alaho, ununura kaj universala dio, kaj je la dia revelacio kiu estis farita al la lasta profeto Mohamedo (paco kaj benoj estu sur li)⁸.

pri internaj aferoj, kiel prezidento de la «Fondation de l'islam de France» (Fondaĵo de la islamo de Francio), lanĉita de la ŝtato en 2016 por financi la «bonan» islamon, ja paternalismece. Eĉ la nomo de la *Proklamo* estas iel respondo al tiu Fondaĵo, ĉar ĝiaj aŭtoroj substrekis ke ĝi temas pri islamo *en* Francio, dum la Fondaĵo celas la kreon de islamo *de* Francio, kvazaŭ se Francio havu apartan islamon kontrolita de ŝtato kiu pretendas esti laika (pri laikeco, vidu la noton 14).

4. Per «plipotenciĝo» mi tradukas «montée en puissance»; klaras do, laŭ la aŭtoroj de tiu *Proklamo*, ke perfortema islamismo estas pli forta hodiaŭ ol hieraŭ.

5. Per tiu vorto «novaĵo», mi provas traduki la francan «innovation», tre probable mem traduko de la araba «دعة» (*bid'ah*), grava en la islama jurisprudenco (فقه, *fiqh*, kiu estas kvazaŭ islama teologio).

6. En la araba: اجتهاد.

7. La franca vorto estis «savants», probable traduko de عُلمَاء (*'ulama*), kiun oni ĝenerale tradukas per la Esperantlingva vorto «ulemo». Sed ĉar la franca vorto «oulémas» ankaŭ ekzistas kaj ne estis uzita de la aŭtoroj, mi decidis ne uzi ĝin ankaŭ en Esperanto.

8. Tiu estas alia vortumo de la «ŝahada» (شهادة), la islama kredkonfesio: «mi atestas ke ne estas alia diaĵo krom Dio, kaj ke Mohamedo estas la sendito de Dio» (أَشْهَدُ أَنْ لَا إِلَهَ إِلَّا اللَّهُ وَأَشْهَدُ أَنَّ مُحَمَّدًا رَسُولُ اللَّهِ). Ekstremistoj islamanaĵoj provas malpligrandigi tiun difinon, malpermesante al pli «liberalaj» islamanoj diri sin islamanoj; tiu punkto memorigas ke neniu rajtas tion fari. Mankas tie io, tamen: nenie en la *Proklamo* tiuj kiuj estis islamanoj sed ŝanĝis ilian opinion, konfesiante

5. Ĉiu islamano havas kiel devon respekti la reciprokecan etikon: ĉiel oni traktu la aliulon kiel oni volus esti mem traktata⁹. La profeta tradicio ja diras: «vi estos islamanoj nur kiam vi volos por la aliaj tion, kion vi volas por vi mem¹⁰».
6. Ĉiu islamano havas kiel devon esti pardonema: la sankta Korano emfazas la neceson scii pardoni.
7. Ĉiu islamano havas la solidarecon kiel devon: li praktiku la almozon por la plej malriĉaj, proporcie de siaj eblecoj.
8. Ĉiu islamano havas kiel devon kultivi sian konon de ĉiaj sciencoj kaj scioj. El tio sekvas ke la obskurantismo, la rifuzo de la scienco, la rifuzo de la scienca progreso, estas falsaj legadoj de la islamo.
9. Alaho kreis la universon kaj ĉion, kio estas en ĝi. La plej antaŭeniritaj sciencaj teorioj lasas sen respondo la demandon de la unua kaŭzo de la naskiĝo de la universo. El tio sekvas ke ili estas akordigeblaj kun la islamo.
10. Alaho kreis la homaron. Estas neniu malakordo inter la kreo de la homaro laŭ la sankta Korano, kiu rivelacias metafore ke Adamo estis modelita de la tero, kaj la nuntempaj sciencaj teorioj la plej antaŭeniritaj, laŭ kiuj la homaro estis modelita per sinsekvaj evoluoj de teraj specioj¹¹.
11. Alaho kreis la homaron dezirante ĝin frateca. Ĉiu islamano do estu aktivulo sub ĉiaj cirkonstancoj por la paco kaj kontraŭ la milito, por la frateco kontraŭ la rasismo, por la konkordaj paroloj kontraŭ la malamigaj paroloj.
12. Kiam li aŭdas iun ajn paroli malveron aŭ antaŭjuĝojn pri kio estas la islamo kaj pri kiaj estas la islamanoj, la plej bona respondo de islamano estas fari bonajn agojn.
13. Kiel memorigas la profeta tradicio, la praktiko de la preĝo neniel kreu malordon aŭ konfuzon.
14. Francio ne estas islama tero¹² : ĝi estas tero kie kune ekzistas diversaj religioj inkluzive de la islamo, kune kun loĝantoj kiuj estas ateoj aŭ agnostikuloj. Kun tiu ĉirkaŭaĵo, ĉiu islamano memkompreneble respektu la valorojn kaj leĝojn de la Franca Respubliko. Ekzemple, ĉar blasfemo kaj religia karikaturo estas laŭleĝaj en Francio, oni rajtas deklari sin vundita aŭ insultita sed oni ne postulu ilian malpermeson nek reagu perforte. Pli larĝe, memkompreneble,

alian religion, ateismon aŭ agnostikismon, estas priparolataj. Tio estas grava manko, sed laŭlitere tiu artikolo solvas la problemon: iu, kiu ne konfesiĝas la ŝahadon ne estas islamano, kaj do la islamana komunumo havas nenion por diri al li. Malfeliĉe, tio ofte ne okazas tiel.

9. Tiu punkto estas la centro de la unua versio de la homaranismo de Zamenhof, konata sub la nomo «hilelismo».

10. Tio estas fama hadito, t.e. parolo de Mohamedo transigita de la tradicio (en la araba: «لا يؤمن أحدكم حتى يحب» (لا لأخيه ما يحب لنفسه)), kiu plej ofte estas tradukata tiel: «neniu el vi estos kredanto ĝis kiam li ŝatas por lia frato tion, kion li ŝatas por li mem».

11. Ne klaras tie ĉi ĉu la aŭtoroj apogas sen deteniĝo la teorion de la evoluo aŭ ĉu ili apogas islaman version de la «inteligenta dezajno». Tiu teksto do lasas al la islamano la eblecon elekti inter tiuj du mondkonceptoj.

12. Per tiu esprimo, la aŭtoroj probable tradukas la faman islaman esprimon *dar al-islam* (دار الإسلام), «la hejmo de islamo», kiu estas tradicia esprimo por la landoj kie la kvintagaj preĝalvokoj estas eblaj ĉie.

nenu islamano rajtas postuli ke Francio ŝanĝu siajn valorojn kaj leĝojn por akordiĝi kun sia propra fido, samkiel nenu kristano, nenu judo, nenu ateo, nenu agnostikulo, rajtas tion¹³.

15. Laŭ la leĝo de 1905, laikeco estas principo de neŭtraleco de la ŝtato, de la administracio, de la publikaj servoj, kaj de la ŝtatfunkciuloj, rilate al la religioj kaj spiritecon. Alie vortumite, la Franca Respubliko financas neniun kulton, akceptas neniun peton formulita nome de kulto, apogas neniun kulton, praktikas neniun enmiksiĝon en la vivo de iu kulto, kaj simple donas al ĉiu religia komunumo la samajn rajtojn kaj devojn kiel al ĉiu asocio en la lando, ĉu kulta ĉu ne. Ĝia difino tiele memorigita¹⁴, la ĉeesto de islama religia fakto en la franca socio estas akordigebla kun laikeco.
16. Laikeco ne estas maltolerema principo kontraŭ la videbleco de la religia fakto en la publika spaco. Tiuj kiuj volas redefini ĝin tiele eraras kaj ege malbone komprenas la leĝon de 1905.
17. Pri la versikloj rilataj al la ĉasteco kaj pudoro vesta por la virhomoj kaj hominoj, nepras memori la ĝeneralan principon de ĉiam pudora vestaĵo, kaj ne la apartaj vestaĵoj cititaj. El tio sekvas ke virhomoj kaj hominoj kiuj konfesiis islamon simple havas kiel devon vestiĝi dece¹⁵.
18. Kun la emo necesa al la praktiko de la islama fido hodiaŭ konsideri la nuntempan ĉirkaŭaĵon, la korpaj punoj, la poligamio ne havas kialon por plu ekzisti. Kun la sama emo, la egaleco inter virhomoj kaj hominoj nepras.
19. En siaj sociaj, familiaj, kaj afekciaj interrilatoj, ĉiu islamano havu plenan kaj responsan maturrecon.
20. En sia ĉiutaga vivo, ĉiu islamano estu sobra kaj serĉu la oran mezon.
21. Ĉiu islamano manĝas halalan viandon. La animala sufero ne estas akceptata de Alaho. Necesas do malgrandigi maksimume la suferon de la animalo¹⁶.
22. Dum la ramadana monato, ĉiu islamano abstinis trinki, manĝi, seksumi, fumi se li fumadas, de la albo ĝis la kuŝo de la suno, por memorfesti la koranan revelacion. Kaze ne malebleco, la kredanto anstataŭigu sian faston per almozo aŭ per alitaga fasto. La malsanuloj, samkiel la hominoj gravedaj aŭ dum iliaj menstruaĵoj, povas ne fasti. La regulo kiu haltigas la faston dum la vojaĝoj ne aplikeblas memkompreneble por kelkhora veturo en trajno aŭ aviadilo. Plie,

13. Tradicie, ĉirkaŭ la *dar al-islam* estas la *dar al-harb* (دار الحرب), la «hejmo de la milito». Tiu «milito», tamen, ne estas nepre perforta: ĝi povas ankaŭ simple esti paca misia milito kontraŭ la aliaj religioj, eĉ se ja tiu vorto iel akceptebligas la uzadon de perforto ekster la *dar al-islam*. Ekde la 15^a jarcento, tiu vorto de milito ne ŝajnis bone elektita al islananaj ulemoj (nek *dar al-islam* nek *dar al-harb* troviĝas en la Korano aŭ en la haditaj), ĉefe otomanaj; ekde tiu tempo ofte aperas novajn «hejmojn». La «hejmo» priskribita en tiu *Proklamo* ŝajnas al mi esti la *dar aŝ-ŝahada* (دار الشهادة), la «hejmo de la atesto», sed tiu esprimo (samkiel *dar al-harb*) ne estas uzita.

14. Laikeco estas ofte misuzata de la povo kaj miskomprenita de la kredantoj ajnreligiaj. La *Proklamo* do nepre unue difinu laikecon antaŭ ol simple diri ke islamano estas akordigebla kun ĝi. Tio ne estas maniero por sindistanciĝi de ĝi, kaj la difino uzita estas tute konforma al la vera leĝo de 1905.

15. Oni scias ke, en Francio almenaŭ, la ĉefaj polemikoj kontraŭ la islamano estas vestaĵaj (rifuzo de la kaptuko, de la «burkinio», ...). Tiurilate, tiu artikolo ŝajnas revolucia: neniua aparta vestaĵo estas deviga, nur dececon estas. Mi persone ne havas problemon kun la kaptuko (se ĝi estas surmetita libere), sed mi ĝojas se ĉiu islamano rajtas elekti surmeti aŭ ne tiun vestaĵon, sen elekti inter «la francaj valoroj» (kiel se la respublikaj valoroj havus ion por diri pri la vestaĵoj...) kaj ilia religio.

16. Jen ekzemplode la «ora mezo» apogata en la antaŭa artikolo!

la Ramadano implicas ke la islamanoj respektu la najbarojn: nepras ne tedi la loĝantaro, inter alie dum la nokto¹⁷.

23. La profeto Mohamedo (paco kaj benoj estu sur li) proklamis mem, pere de la Konstitucio de Medino¹⁸, ke tiuj, kiuj kredas je la unueco de Alaho, ĉu ili estas islamanoj, ĉu judoj aŭ ĉu io alia, estis membroj de la sama komunumo de la Libro. El tio sekvas ke ĉia formo de kontraŭjudismo¹⁹ estas kontraŭa al la instruo de la profeto Mohamedo mem (paco kaj benoj estu sur li). Pli larĝe, sekvante lian ekzemplon, la islamo implicas la virtojn de toleremo kaj bonkoreco, ĉar nur Dio estas juĝisto.
24. Estas malimplicite malpermesata al ĉiu islamano komenci militon, ĉar tiu tipo de ĝihado²⁰ estas permesata nur kontraŭ agresanto (Korano 2, 190²¹). Plie, se la kontraŭulo estas preta starigi pacon, la islamanoj havas kiel devon serĉi ankaŭ obteni la pacon. El tio sekvas ke la krimuloj kiuj pretendas esti «ĝihadistoj» estas malpiaj uzurpuloj de la ĝihado kaj, konsekvence, malpiaj uzurpuloj de la islamo, kiu estas la religio de la paco.
25. La ĝihado la plej nobla estas la streĉoforto de sinkomando, de sinsuperado, por atingi la virtojn de la plej bona el la islamanoj.

17. Multas en tiu *Proklamo* la vere pragmataj atentigoj. La islamo estas religio fremddevena en Francio, kaj multaj tradicioj kaj agemoj estas tute neŭtralaj morale, sed iel ĝenas la iom malfermatajn francojn. Iuflanke, la neislamanoj ja rajtas dormi, eĉ dum la ramadanaj noktoj. Tamen, la francaj islamanoj ne estu traktataj kiel fremduloj en ilia propra lando, kaj ili rajtas vivi kiel ili volas. La ora mezo ja estas tute serĉinda, sed ne nur de la islamanoj.

18. La konstitucio de Medino (دستور المدينة, *dastur al-madinah*), pli ĝuste nomata ĉarto de Medino (صحيفة المدينة, *sahifat al-madinah*) probable (se ĝia historieco ŝajnas sufiĉe certa, ĝia dato estas pli pridiskutata) estis proklamita de Mohamedo en 622 p.J.-K., do tuj post la heĝiro (هجرة) kaj la alveno de Mohamedo en Medinon. Ĝi ne troviĝas en la Korano, sed en okjarcentaj kaj pli malfruaj libroj, kaj kreas komunumon (أمة, *ummat*) en kiu estas kaj islamaj kaj judaj triboj.

19. Sama rimako kiel en la noto 2.

20. En la araba, جهاد signifikas «sinforgeson», «fortostreĉon», «lukton» aŭ «reziston», kaj tute ne nepre estas perforta, eĉ kontraŭe. Oni do ne miru vidante aperi tiun gravan vorton de la islama jursiprudenco en teksto tute ne ekstremisma.

21. «وَقَاتِلُوا فِي سَبِيلِ اللَّهِ الَّذِينَ يُقَاتِلُونَكُمْ وَلَا تَعْتَدُوا إِنَّ اللَّهَ لَا يُحِبُّ الْمُعْتَدِينَ.» «Batalu en la vojo de Alaho tiujn kiuj batalas vin sed ne transpaŝu. Ja Alaho ne ŝatas transpaŝistojn.» Tiu versiklo estas rekte sekvita de alia fama versiklo, ofte citata de polemikistoj sen la kunteksto, kiu diras «kaj mortigu ilin ĉie kie vi trovas ilin» («وَأَقْتُلُوهُمْ حَيْثُ تَقِفْتُمُوهُمْ.»).

Estas stranga por mi ke tiu versiklo kaj en tiu artikolo de la *Proklamo* estas la nura citaĵo de la Korano. Ĉiel, tio gravigas ankoraŭ pli tiun artikolon: la islamo apogata de tiu *Proklamo* estas pacema.